

n-ro du

03/2026

KOMETO

Unua Kongreso de ZOMBERANTO



Fanzino
pri strangaj
mondoj

ZOMBIOTI!

KOMETO

ZOMBIOJ!

Enhavtabelo

3. Jen la zombioj!
7. Unua Kongreso de Zomberanto
11. La rito de la Smeralda Ĝojo
14. Komikso: Zombia krizo en rekta elsendo
17. La Pomaĉetanto
19. Rekomendo: Ludu rete en Esperanto
21. La Zombiaj Rajtoj
25. Mi nomiĝas Gary
31. Bonvenon sur la Luno
35. Recenzo: Frenezzono
36. Ĝis!



La *Associació Cultural Ĝuo* estas ne-profitcela asocio fondita en Reus, sude de Katalunio, registrita en la Kataluna Registro de Asocioj kun la numero 70889.



Marto 2026

Eldonas:

Associació Cultural Ĝuo
C/ Argentera, n-ro 8, 5^o 1^a
43202 Reus

Redaktoroj:

Toni Espinosa
Ludoviko de G.A.

Enpaĝigo:

Toni Espinosa

Korektanto:

Toño del Barrio

Retadreso:

asociaciongxuo@gmail.com

DL: T 1004-2025


ISSN: 3081-7242

Senprofita publikaĵo.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj.




La fanzino estas publikigita laŭ la permesilo Krea Komunuaĵo CC-BY, krom se en la artikolo aperas alia indiko.



Vodua statueto. Benino. Ĉirkaŭ 1900.
Musée africain de Liono. Vikipedio.

Jen la zombioj!



Ĉu vi iam, meze de homamaso, sentis vin kiel en la stranga fluo de zombia marŝado? Aŭ estante ĉirkaŭita de nekonatoj, ĉu vi iam pridubis, ĉu ili vere vivas aŭ ĉu ili estas nur malplenaj hompupoj? Se vi iam sentis almenaŭ ombron de tiaj sentoj en via koro, ĉi tiu fanzino estas por vi.

Zombioj, kompare kun homlupoj, vampiroj aŭ fantomoj, estas la plej lastatempaj monstroj, tiaj, kiuj plene kaptas iujn zorgojn kaj timojn de nia epoko. La numero de Kometo, kiun vi havas ĉemane, estas dediĉita al ili; tamen la enhavo restas fleksebla, kvankam niaj putraj amikoj estas la ĉefa temo.

La folkloro zombio venas el la vuduaj ritoj, en kiuj, laŭdire, *bokoro* (vudua magiisto) punas iun, igante lin aŭ ŝin sia senanima, pupsimila sklavo. Kurioze, oni ne timas la zombiojn mem, sed la eblon esti zombigita de malica bokoro. Kvankam la unua apero de zombioj en kino okazis en la filmo *White Zombie* el 1932, la bildon, kiun ni havas en la menso, ni devas danki al George A. Romero pro lia filmo de 1968, *La nokto de la vivantaj mortintoj*.

Zombioj fascinas nin, eble ĉar ili permesas al ni sublime alfronti la timon pri morto per troaj makabraĵoj. Aŭ eble, ĉar ili flustras al ni: amiko, ankaŭ vi marŝas en amaso kiel vorema konsumanto, bedaŭrinda sklavo, ensorĉita de iu bokoro pere de amaskomunikiloj.

Nun, homo aŭ zombio, ni invitas vin vori la enhavon de nia fanzineto:

Unua Kongreso de Zomberanto. En tiu horor-humura rakonto, laŭ la plej ĝuebla tradicio de la B-serio, vi malkovros, kio okazas, kiam frakasita toksa barelo falas en varsovian tombejon.

La rito de la Smeralda Ĝojo. Tiu ĉi sciencfikcia rakonto kondukas nin al renkonto kun estaĵo, kiu memorigas pri bokoro. La teksto ludas per allogo, fremdeco kaj transformiĝo, ĝis la leganto ne plu certas, ĉu temas pri savo aŭ kondamno.

Zombia Krizo en rekta elsendo. En ĉi tiu komikso de Alejandro Jiménez Cid, kunlaboranto de la fanzino Frenezzono, la zombia katastrofo eksplodas antaŭ niaj okuloj kun vigla desegnarto kaj ironia energio. Ĉu la malamiko estas nur ne-konata amiko?

La pomaĉetanto. Ĉi tie la hororo ne venas per kriegoj nek per tomboj malfermitaj, sed tra la tordo de io ridinde ordinara. Kio igas agon malica? Ĉu la malbono troviĝas en la faro mem, aŭ en la tono, la maniero, la ĝuo? Rakonto kvieta, maltrankviliga kaj strange akra.

Zombiaj rajtoj. Ĉiuj pretas kortuŝiĝi pri la infanoj, la katoj kaj la hundoj. Sed kiu zorgas pri la zombioj? Ĉi tiu teksto faras ĝuste tion, ĝi traktas la demandon pri zombioj en vere jura maniero. Kvankam la fono estas fantasta, la formo restas serioza. Kian efikon tio havas sur la leganto?

Mi nomiĝas Gary. Oni kutime ne demandas al zombio, kiel li fartas, ĉar oni preferas kredi, ke li ne sentas, ne pensas, ne memoras. Sed Gary havas voĉon, kaj lia voĉo estas laca, amara kaj terure homa. Tiu rakonto proksimigas nin al la monstro ĝis ĝi fariĝas spegulo.

Bonvenon sur la luno. Jen rakonto inspirita de la filmo Atako de la lunaj zombioj, en kiu absurdaĵo, nostalgio kaj la plezuro de la B-serio miksiĝas en unu sola deliro.

Recenzo: Frenezzono. En movado, kie malabundas fanzinoj, Frenezzono aperas kiel io aparte estiminda: viva ekzemplo de memfarita eldono, libera esprimo kaj papera obstino. En ĉi tiu recenzo ni atentis ne nur la enhavon, sed ankaŭ la artan spiriton de fanzineco.

Ankaŭ en ĉi tiu numero ni proponas al vi pliajn ĝuindaĵojn: ni rekomendas al vi retan ludon el la laboro de esperantisto, kaj nian propran klopodon revivigi malnovajn enciklopediajn ilustraĵojn per zombia tuŝo.

Kaj ne forgesu, kara leganto: legi tion bite ne egalas al la plezuro teni en la mano la veran, paperan fanzinon. Se vi volas kontribui al la venonta numero de Kometo, ne hezitu kontakti nin.

TE



Filmero el "La nokto de
la vivantaj mortintoj"
(G. A. Romero. 1968)

Unua Kongreso de Zomberanto



Kaŝita de la nokto, la kamiono voris la ŝoseon. En la okuloj de la ŝoforo brilis la urĝo liveri kiel eble plej rapide la mortigan ŝarĝon al iu mistera kapitano, atendanta en la haveno. Ĉe ĉiu agresema turnado de la stirilo, la metalaj bareloj en la ŝarĝejo tintadis, kvazaŭ denta frapado de giganta kranio.

Sed la kurbo ĉe la Varsovia tombejo montriĝis pli akra ol antaŭvidite. La kamiono glitis flanken kaj la premo de la bareloj eksplodigis la postajn pordojn. Terura krako ŝiris la nokton, frostigante la koron de la ŝoforo.

La kamiono bremsis kun longa grinca ĝemado. Tremante, la viro eliris kaj ĵetis singardan rigardon ĉirkaŭen. Unu el la bareloj estis elfalinta kaj nun kuŝis krevita, verŝante sian venenon sur la tombejan grundon. "Nu", li murmuris, "pli bone lasi tion en tombejo ol en lernejo", provante forskui de sia menso la angoron. Poste, li perbate fermis la pordojn, regrimpis en la kabinon kaj daŭrigis sian frenezan fuĝon tra la nokto.

Sed vi, kara leganto, bone scias: neniam estas bona ideo lasi toksan barelon en tombejo.

La verda likvo elfluanta el la frakasita barelo kolektiĝis en baseneto, de kie ĝi serpentume ekfluis laŭ vojetoj inter la tomboŝtonoj, kiuj reflektis ĝian fluoreskan verdan lumeton. Naŭziga brumo leviĝis kaj plenigis la aeron per neeltenebla stinko de putriĝinta karno kaj kaŭstikaj kemiaĵoj. Dum la minutoj pasis, la verda lumo malfortiĝis, kaj la fetoro cedis sian lokon al odoro de internaĵoj de buĉitaj bredbestoj, miksita kun pika amoniako.

La butera luno sur la nigra ŝtofo de la nokto, ĉirkaŭita de la lumaj ponardaĵoj de la steloj, atestis la groteskan transformiĝon de la pejzaĝo. Subite, sekputra brako elŝoviĝis el la grundo. Lu mortinto leviĝis el sia eterna domo kaj reeniris la mondon.

Kvankam liaj movoj estis malrapidaj kaj lia menso obtuza, li ne aspektis fiaĉa kiel kutima zombio. Li staris kun ia stranga eleganteco, kvazaŭ li regus la situacion. Li estis vestita per kompleto, kalva, kun bonorda barbo kaj rondaj okulvitroj. Sur lia brusto, ankoraŭ videblis verda stelo de velkinta brilo. Kvazaŭ komprenante la situacion, li premis la manplaton kontraŭ sian bruston. Post kelkaj minutoj da peniga rezonado, longa vea ĝemo eliris el lia gorĝo, ne panike, sed diagnoze: li estis vivanta mortinto.

Li klinis sin al la fluoreska likvaĵo, prenis iom en la kavo de siaj manoj, trinketis kaj frotis la restaĵon sur la vizaĝon. La efiko estis surpriza: unu sola korbato sentiĝis, preskaŭ nur kiel vibrado, kaj lia menso reordigis sin kiel ludgloboj ĵetitaj en skatolon.

Tiam, rampanta bruo ekŝveliĝis ĉirkaŭ li. El inter la tomboj. De malantaŭ klinaj tomboŝtonoj kaj mallumaj cipresoj, unu post la alia leviĝis aliaj kadavroj. Ili venis ŝanceliĝante, amase kolizianta, tro mallertaj por esti timigaj kaj tro makabraj por esti ridindaj. El iliaj buŝoj sonis tusoj, raŭkaj ĝemoj, graŭloj kaj sibloj de truitaj gorĝoj. La Majstro reagis frapante siajn ostecajn manplatojn. Okuloj kaj malplenaj okulkavoj direktiĝis al li. Kiel parolanta pupo, kiu eldiras registritajn frazojn, li levetis la manon kaj, kvazaŭ parkerante, diris:

— Samideanoj... hodiaŭ, inter la gastamaj muroj de ĉi tiu tombejo, kunvenis ne fantomoj kun kadavroj, ne monstroj kun feoj, sed... zombioj kun zombioj!

Silento momente falis sur la malhele ĝemanta amaso, kaj poste eksonis mismaniere ĝojaj krioj.

La Majstro daŭrigis:

— Ripetu kun mi: amiko!

— Aaaa-iiii-ĥĥooo! — elblekis la nekonsonantaj buŝoj, kiuj kun difektitaj lipoj kaj sekaj langoj nekapablis moduli la elirantan aeron.

— Mi bedaŭras, ke interkomunikado estas por vi iom... anatomie malfacila. Vi bezonas novan Esperanton. Mi dirus... Zomberanton! Kun la vokaloj sufiĉos. Viaj vermomanĝitaj cerboj ankaŭ ne multe pli bezonas.

Li demonstris groteske instruiste:

— O! — li ekkriis, fingromontrante al la arbo.

— A! — li aldonis, montrante sian... makabre feliĉan vizaĝon.

— I! — li diris, kvazaŭ dancante.

Tiam la zombioj komencis signi (foje senfingre), kaj la tombejo ekpleniĝis je malprecizaj, sed entuziasmaj eĥoj:

— Oooo... oooo!

— Aaaa!

— Iiiii!


En la okuloj de la Majstro momente ekflamis lumo, kiu preskaŭ memorigis pri vivo. Kongresoj, verdaj steloj, paroladoj pri monda frateco. Sed la nokto ne intencis eterne protekti tian kongreson. Sur la proksimaj montetoj jam aperis maldika brila linio de tagiĝo.

La novaj samideanoj daŭre kriegis siajn zombesperantajn vokalojn, ne rimarkante la danĝeron. Ĉe la unuaj sunradioj, ili komencis fandiĝi kiel kandeloj sur blasfema altaro. La Majstro mem jam estis duone degelinta kvazaŭ vakso. Li rezignacie rigardis la leviĝantan sunon.

— Nu... almenaŭ ne estis tempo, por ke ili komencu postuli reformojn.

Kaj li kunfandiĝis kun siaj lernantoj en unu grandan fluoreskan vaporon. Kaj per flugiloj de facila vento, ĝi flugis de loko al loko.

Toni Espinosa
2026



La rito de la Smeralda Ĝojo



Neoficiala raporto de d-ro Lira Andros, fremdneŭrala biologisto – Ŝipo Khepri-7, Mírmarmar III

Kiam ni alteriĝis sur Mírmarmar III, ni sciis, ke ĝi ne estas ordinara planedo. La montoj moviĝis malrapide, kvazaŭ dormemaj bestoj, la arboj flosis kiel ŝelaj meduzoj, kaj la aero odoris je dolĉa metalo. Sed tio, kion ni ne sciis, kaj kion neniu povis imagi, estis, ke en tiu mondo ekzistis formo de vivo mergita en biologia rito, kapabla transdoni memorojn kaj identecojn de unu viva estaĵo al alia.

Ni malkovris ĝin post kelkaj tagoj. Flosanta vivformo, smeralde verda kun malluma ora tono, kiu ne havis okulojn nek buŝon, sed posedis sensajn tentaklojn ĉe la korpo, per kiuj ĝi povis tuŝi aferojn... kaj kompreni ilin. Ni nomis ĝin la vespo de la Smeralda Ĝojo, kvankam ĝi ne havis rilaton kun teraj vespuloj. Ĝi estis pli eleganta. Pli preciza. Pli... inteligenta.

Ĝia rito komenciĝis per kaptado de alia loka estaĵo: Karongo, giganta molusko, mola kaj malrapida, kiu pasigis la vivon veke sonĝante – laŭvorte. Sciencistoj opiniis, ke tiuj bestoj posedis konscion bazitan sur imagaj memoroj. Ili estis naturaj sonĝuloj. Kaj la vespo sciis tion.


La vespo surmetis sin sur Karongo kaj, kun preskaŭ ceremonia precizeco, enpremis kudrilon ĉe la bazo de ĝia mola kranio, en tiel ĝusta punkto, ke ŝajnis, kvazaŭ ĝi legas sekretan mapon. Karongo restis senmova, sed viva. Kaj ne nur senmova: ĝi obeis. Poste ĝi lasis sin esti trenata de la vespo al subtera kaverno, kvazaŭ sorĉita besto, kvazaŭ obeema hundo kun nevidebla koloŝnuro.

Tie komenciĝis la plej stranga parto.

Kun kirurgia precizeco, la vespo enmetis travideblan ovon en la korpon de Karongo. Sed antaŭ ol fari tion, ĝi milde karesis ĝian haŭton per la tentakloj, kvazaŭ serĉante la ĝustan lokon por ĝin meti. Kaj ĝi ĉiam trovis la perfektan punkton. Ĝiaj tentakloj kaptis nervajn signalojn, elektrajn impulsojn, etajn movojn... Estis kvazaŭ ĝi legus la mapon de la nerva sistemo de Karongo per la fingropintoj.

Se ĝi metus la ovon en la malĝustan lokon, la larvo povus morti. Sed la vespo neniam eraris.

Eloviĝinte, la larvo komencis manĝi. Sed ne kiel sovaĝa kaj malsata estaĵo. Ne. Ĝi manĝis laŭ ordo. Ĝi evitis la vivgravajn organojn, ĉirkaŭiris la koron, lasis la cerbon netuŝita kiel eble plej longe. Karongo restis viva, eĉ konscia. Kaj jen venas la plej miriga parto.



Ĉifita papero trovita en la monujo de la kadavro de Joano Skalrolev, nevino de ŝipulo el Khepri-7.

La larvo lernis de sia gasto. Ĝi sorbis la memorojn de Karongo, la revojn, kiujn ĝi havis, la vivojn, kiujn ĝi imagis. Ĝi metaboligis ilin. Ĝi faris ilin siaj.

Kiam la larvo emerĝis, ĝi jam ne estis nur vespo. Ĝi estis vespo kun memoro, kun fremda historio ene de si. Ĝi ne manĝis nur karnon, ĝi manĝis spertojn. Ĝi estis estaĵo formita el la sinteco de alia. Kaj poste... Ĝi leviĝis, radianta kiel viva smeraldo, por ripeti la ciklon.



La Scienca Konsilio ordonis tujajn kvarantenajn mezurojn. Ili klasifikis la estaĵon kiel "Nivelo 7 – Ontologia Biominaco". Malpermesite studi ĝin. Malpermesite alproksimiĝi. Tro danĝera.

Sed mi, d-ro Lira Andros, ne povas obei tiun ordonon.

Mi vidis ĝin proksime. Mi sentis ĝin en mia menso. Mi scias, ke, se la vespo elektus min, ĝi povus fari min nova. Forviŝi miajn timojn, mian malĝojon, kaj plenigi min per valoraj memoroj de iu Karongo, kiu revus, ke ĝi flugas. Aŭ ke ĝi amas.

Ĉi-nokte mi eliros el la ŝipo.

Mi lasos mian korpon sur la tero kaj atendos ĝin.

Kaj se ĝi enpikos min kaj enmetos la ovon...

Eble fine mi vivos memorindan vivon.

Fina noto: Ĉi tiu teksto estis trovita el la borda taglibro de la Khepri-7. Neniu spuro de d-ro Andros estis trovita. Sed ĉe la tagiĝo de la dekdua tago, brila figuro flosis tra la ĉielo de Mírmar III, kun verdaj flugiloj kaj okuloj plenaj de homaj memoroj.

Ludoviko de G.A.

Vilafranca del Penedès, julio de 2025



POR ANALIZI LA SITUACION NI HOPIAŬ GASTIGAS GENERALON STARBUCKS, EL LA ARMITAJ FORTOJ, KAJ DOKTORINON GRISELDA MABUSI, PROFESORINON PRI ZOMBIOLOGIO ĈE LA CENTRA UNIVERSITATO.

GENERALO, KIAN AGADPLANON VI PROPONAS?

NI NE POVAS MORTIGI LA ZOMBIOJN PER NIAJ KUGLOJ! NI NE POVAS MORTIGI ILIN, ĈAR ILI JAM ESTAS MORTINTAJ! TIO FRENEZIGAS MIN!



TRANKVILIĜU, GENERALO, TRANKVILIĜU.



LA SOLA SOLVO ESTAS KOMplete DEZERTIGI ĈIUJN INFEKTIITAJN REGIONOJN PER ATOMAJ BOMBOJ. LA VARMEGO KAJ LA RADIADO VAPORIGOS TIUJN MALPURAJN ZOMBIOJN ĈIS LA LASTA PUTRA OSTO, KUNE KUN ĈIU SPURO DE VIVO EN LA AREO. ĤA ĤA ĤA! MI APENAŬ POVAS ATENDI PREMI LA RUĜAN BUTONON...




DANKON, GENERALO. SIAFLANKE, DOKTORINO MABUSI GUIDAS SCIENCAN ESPLORON PRI LA ZOMBIMINACO.

^ TUTE ĜUSTE

ĈU VI POVUS RAKONTI AL NI ION PRI TIO?


KUN PLEZURO!

NI KONSTATIS, KE ZOMBIOJ, ESTANTE JAM MORTINTAJ, NE BEZONAS NUTRAĴON, KROM FOJFOJE IOM DA HOMA KARNO, KAJ ILI MOVIĜAS PIEDE ANSTATAŬ UZI MOTORVETURILOJN. SEKVE, ILIA VIVMODELO MONTRIĜAS RIMARKINDE PLI DAŬRIGEBLA KAJ MEDIO-PROTEKTA OL LA NIA.



KROME, LA STAĜANTOJ, KIUJN NI SENDIS AL LA ZONO REGATA DE LA ZOMBIOJ, RAPORTIS AL NI PRI ILIA SOCIA KAJ POLITIKA SISTEMO. INTER ZOMBIOJ NE EKZISTAS KLASAJ DIFERENCOJ. ILI DISPIDIDAS ĈION EGALE KAJ FARAS SIAJN DECIDOJN PER ASEMBLEOJ. LA MEDICINA PRIZORGO KAJ LA EDUKA SISTEMO ESTAS SENPAGAJ KAJ ALTKVALITAJ. ILI ANKAŬ MONTRAS GRANDAN INTERESON PRI LITERATURO, ARTOJ KAJ MUZIKO, KAJ INTER SI KOMUNIKAS EN ESPERANTO.

SEKVE, MIA TEAMO KONKLUDIS, KE LA PLEJ RACIA STRATEGIO ESTAS SIMPLE PERMESI AL LA ZOMBIA INVADO DISVASTIĜI TUTMONDE.



ŜAJNAS, KE LA HODIAŬA DEBATO ESTOS APARTE INTERESA



El la pentraĵo de Gabriël Metsu (1629 - 1667), *Appels schillende keukenmeid*. Ĉirkaŭ 1650. Vikipedio.

La Pomaĉetanto



Verdaj ruĝaj aŭ flavaj, plaĉas al li pomoj ĉiukoloraj. Kiam li prenas unu, la fingroj hezitas, la spirado mallongiĝas, la manoj ekŝvitas. La frukto estas levata ĝis la vizaĝo kun ia malhela antaŭĝojo. Poste sekvas tro ĝentila pago. La pomo trovas lokon en ĉifita plasta saketo. La troa ĝentileco ĉagrenas la frutiston. Stranga viro, tiu, kiu aĉetas pomojn nur unuope – sonas la penso de la vendisto.

Kun sia trezoro, la viro rapidas hejmen per kalkulitaj paŝoj. Foje okazas renkonto kun policano, kaj nia amiko provas eviti la rigardon. Oni diras, ke nervoza aspekto antaŭ policano povas konduki al haltigo. Tiu leciono estas konata ĝis la ostoj. Kiom da fojoj necesis jam malfermi la saketon. Ĉu drogoj... ĉu armilo... sed la policano ĉiam trovas nur pomon en ĉifita plasta saketo. Kaj ĉiufoje, kiam la uniformo foriras, ekestas interna rido.

Hejmveninte, li iras rekte al la kuirejo, metas la pomon sur la tablon kaj prenas tranĉilon. La klingo lumas momenton, kaj li komencas malrapide senŝeligi la pomon. La ŝelo cedas en longaj strioj. Sub ĝi, la pala karno aperas mola kaj malseka. El la vundo ekelfluas gutoj da pomsuko. Ili glitas laŭ la klingo ĝis lia mano, kaj tiam la viro skuiĝas.

Liaj lipoj tordiĝas en rideton. La emocio iĝas preskaŭ neregebla, kaj plurfoje el la buŝo eksplodas krake freneza ridaĉo, dum la okuloj restas fiksitaj sur la senŝeligata frukto. Subite li eksilentas, nervoze rigardas ĉiunflanken, kaj ŝaltas radion, kies kaŝiga sono plenigas la ĉambron. Li povintus mortigi la pomon, frostigi aŭ kuiri ĝin. Sed ne. Regas la ideo, ke ĝi vivas. Okazas ne nur mutilado de frukta kadavro, sed de vivantulo. Li senŝeligas, senfeligas, senhaŭtigas ĝin vive; malfacilas taksi.

Poste li metas la nudan pomon sur lignan tabuleton kaj distranĉadas ĝin. La frukto disfendiĝas, malfermiĝas, montras sian blankan internon, siajn semojn. Sidado antaŭ la makabraĵo permesas plaĉe rigardi la ŝelon, la semojn kaj la pecojn. La rigardado daŭras ĝis la vivo en ĝi paliĝas, ĝis la koloro bruniĝas, kvazaŭ estus deziro kapti la momenton, kiam la kosmo konsentas pri la fino. La buŝo neniam antaŭe gustumis ĝin. Sed hodiaŭ bruna peceto estis manĝata. Kial? Ne sciante. Io al tio pelis lin.

Naŭzo leviĝas kiel malvarma ondo. La kuirejo subite fariĝas tro malgranda por la spiro. La karno de la pomo, kiun li ĵus maĉis, nun pezas en la stomako kiel ŝtona kulpasento. Li ne elektis tiun vivon, diras al si. Eble li jam laciĝis de sia sekreto. Eble tial la paŝoj fariĝas foje tro proksimaj al policanoj. Eble tial aperas la espero, ke iu rimarkos la tremon en la manoj, la tro streĉan paŝon, la saketon tro ĉifitan, la rigardon tro malsatan. Iamaniere estas deziro esti malkovrita. Morgaŭ, sonas interna promeso, li iros al la policejo kaj konfesos. Kaj en la silento de la kuirejo denova rigardo al la pomaj restaĵoj naskas rideton. Eble la konfeso povas atendi. Eble, pli bone, morgaŭ estos aĉetata alia pomo.

Toni Espinosa

2026



Rekomendo: Ludu rete en Esperanto

Eble al vi sonas *Minecraft*. Do vi povas ludi similan ludon per libera alternativo: *Luanti*.

Luanti estas videoluda platformo bazita sur libera programaro. Ĝi kreas hazarde generitan mondon, formitan plejparte el blokoj. La ludanto povas kolekti materialojn por konstrui kaj por fabriki (krei) objektojn.

Se vi interesiĝas pri retaj ludoj, vi nepre vizitu la jenan paĝon kaj provu ludi en servilo zorgata de esperantisto:

Jen la QR-kodo por eniri la retpaĝon kun pli da informoj.



<https://notxor.nueva-actitud.org/2025/11/27/ludu-cxe-la-esperanta-servilo-de-luanti.html>





La Zombiaj Rajtoj

La plej terura minaco de la zombioj ne estas la morto mem, sed la facileco aniĝi al ili. Ho, se esperantistoj tiel facile povus varbi adeptojn! Nur unu mordo, kaj jen: nova esperantisto.

Malgraŭ la danĝero, tradicia esperantisto eble ne facilanime ŝaltus motorsegilon por dispecigi mispaŝantajn zombiojn, enirante orgion de visceroj kaj membroj sub neĝado de koagulinanta sango. Do, valoras scii, kiel oni devas ĝuste konduki fronte al zombio?

Por respondi al tiaj zorgoj ni devas analizi, laŭ strikte jura vidpunkto, kiajn rajtojn havas tiaj estuloj. Zombioj estas mondskala fenomeno, sed internaciaj normoj ofte estas tro ĝeneralaj, dum naciaj leĝoj havas siajn apartaĵojn. Tial, por faciligi la esploron, ni fokusos je la hispana jura sistemo. Tamen, la rezonado ĉi tie prezentata povus esti adaptita al aliaj naciaj sistemoj sen tro da peno fare de fakuloj pri jurista zombiologio.

Por ekiri de firma bazo kaj ŝpari al ni grandajn problemojn, ni ne povas simple deklari iun zombio. Ekzistas risko konfuzi ian malsanon, longdaŭran toksan staton aŭ eĉ demonan havantecon kun "zombieco". Tial, antaŭ ol konsideri iun efektive zombio, estu postulata konvena atestilo pri morto, subskribita de kompetenta kuracista aŭtoritato.

La hispana Konstitucio, kiel fundamento de la jura sistemo, ja postulas respekton al la "persono" (art. 10). Tamen tiu esprimo pri "persono" povas esti problemiga por zombioj, ĉar la hispana Civila Kodo diras, ke la civila personeco estingiĝas kun la morto (art. 32). Aliflanke, estas rimarkinde, ke la 15-a konstitucia artikolo establas, ke "neniu" povas esti mistraktata; do ĝi ne referas nur al "persono". Certe, la vivantistoj argumentos, ke

zombioj ne estas "-u", sed "-o". Bedaŭrinde, al ni mankas jurisprudenco por kontraŭbatali tiajn homojn, kiuj senhonte diskriminacias ne-vivantulojn.

Tamen, eĉ akceptante la eblajn kritikojn, la batalo por la zombiaj rajtoj ne estas perdita. Sendube oni povas konsideri zombiojn kiel kadavrojn, kaj la hispana Puna Kodo (art. 526) klare deklaras, ke:

"Kiu, mankante al la ŝuldata respekto al la memoro de la mortintoj, [...] profanus kadavron [...] estos punata per malliberigo de tri ĝis kvin monatoj aŭ per monpuno de ses ĝis dek monatoj."

Sekve, se zombio estus konsiderata kiel reaktivigita kadavro, ĝia mutilado, dismembrigo aŭ detruo sen jura pravigo povus esti konsiderata krimo.


Ankaŭ la Leĝo 1/1985, de la 5-a de majo, pri civila protekto de honoro, intimeco kaj propra reputacio, en la art. 6 establas, ke kiam la posedanto de la rajtoj mortas, la protekto de tiuj rajtoj povas esti plenumata de la rektaj heredantoj. Tamen, la hispana jurisprudenco montras, ke la intenseco de la protekto ne estas samnivela kiel ĉe vivantaj homoj, ĉar la heredantoj ne estas la veraj posedantoj de tiaj rajtoj.

Viditaj tiaj leĝaj konsideroj, kaj sen eniri en komparan juron, ni povas konkludi, ke kvankam zombioj ne ŝajnas esti posedantoj de juraj rajtoj, ili povas esti objekto de juro: tio estas, (1) la ŝtato povus puni la senbazan detruadon de zombioj, se tia ago estus malrespekta al la memoro de la antaŭa persono nun marŝanta kiel zombio; kaj (2) privatuloj rajtus akuzi la detruinton, se ties agoj atentis kontraŭ la honoro de la pasinta persono. Do, forgesu pri motorsegilo por la venonta zombia apokalipso.

Kompreneble, tio ne signifas, ke oni devas lasi, ke la zombiaj



faŭkoj forvoru nin, aŭ sindone ensalti en ilian ne-vivon. Oni rajtas protekti sin, tamen respektante la jurajn konsiderojn. Do, se iam vi alfrontas zombion... ni povas helpi vin! Tuj kontaktu nian advokatan oficejon, specialigitan pri zombia juro (de lundo ĝis vendredo, 8:00–15:00).

Toni Espinosa
2026



Zombia elefanto kreita per artefaritaj intelektoj (*Google Nano Banana* kaj poste plibonigita per *Midjourney*), surbaze de la gravuraĵo de la elefanto el la paĝo 10.

Mi estas eĥo de tio,
kio mi iam estis:
repliko sen emocioj



Humani Victus Instrumenta: Ars Coquinaria.
Nekonata aŭtoro. Jaro 1569. Vikipedio.

Mi nomiĝas Gary



Mi nomiĝas Gary, aŭ almenaŭ tion diras la identigokarton, kiu pendas de mia putriĝanta kolo. Laŭ mia LinkedIn-historio — kiun mi supozas neprizorgita kaj flosanta en iu nubservo —, mi estis *Senior Talent Acquisition Manager*. Nun mia nura talento konsistas el postkurado de homoj, kiuj kuras multe pli rapide ol mi. Certe, refreŝiga kariera ŝanĝo. Neniuj pliaj KPI-oj [1], neniuj sinergioj, nur prahoma malsato kaj viruso nomata Solanum, kiu decidis, ke mia cerbo estu ĝia nova apartamento. Homoj ofte diras, ke zombia apokalipso estas terura. Mi diras, ke ĝi estas la logika kulmino de la libera merkato.

Mi klare memoras la komencon. Ne estis terura eksplodo nek invado de kosmaj kapsuloj el *Santa Mira* [2]. Temis pri esploristo en laboratorio de Kembriĝo, kiu decidis, ke estus bona ideo liberigi ĉimpanzon kun ĥolero. Vere, se vi iam laboris en Departemento pri Homaj Rimedoj, vi tuj komprenos ke la "ĥolerfazo" estis kvazaŭ matenlundo. La ĉimpanzo simple malrespektis la burokracion kaj iris rekte al la afero. Poste venis la Granda Paniko, kaj la homaro montris, kiom malkompetenta ĝi estas por krizadministrado.

Hieraŭ — aŭ tio, kio por mi egalas al hieraŭ — mi vidis grupon da postvivantoj en tio, kio antaŭe estis butikumcentro. Ili provis sekvi konsilojn el manlibro pri supervivo verkita de iu saĝulo, antaŭ ol la mondo disfalis. Ili faris ilojn, kiujn ili nomis "Lobo", miksaĵo de ŝovelilo kaj hakilo, kiu laŭ la teorio aspektas tre efika por taktika "lobotomio".

La problemo estis, ke la ulo, kiu portis ĝin, havis la kapablon de rolulo en B-filmo de la 40-aj jaroj. Li provis bati min en la kapo — la sola maniero por ĉasi min, vi scias — sed li glitis sur amaseton da skatoloj de *Nerf Zombie Strike*.

Estas delikata ironio en tio. Homoj pasigis jarojn prepariĝante por batali kontraŭ ni, aĉetante plastajn armilludilojn, kiuj pafas spongodartojn. La kompatindulo rigardis min per okuloj "tio ne estis en la instrua video de *YouTube*", dum mi donis al li dentan brakumon ĉe la jugularo. Gusto de malespero kaj kafo. Klasikaĵo.

Kio plej amuzas min en mia nova ekzisto estas observi la kolapson de institucioj. La registaro de Usono, en sia senfina saĝo, provis kuraĝigi la loĝantaron per realtempa elsendo de batalo en loko nomata Yonkers. Ĝi estis la plej spektakleca fiasko en la historio de publikaj rilatoj. Modernaj armiloj estas mirindaj kontraŭ homoj, kiuj timas morti, sed ni ne havas superviv-instinkton, ni ne sentas doloron kaj ni fajfas pri la prezo de benzino.

Soldatoj pafis al la brusto, atendente, ke ni haltu kaj petegu armisticon. Sed, ni simple iris plu, kiel zombia promenado de amatoroj ekster kontrolo.

Foje mi renkontas aliajn "dungitojn" de *Umbrella Corporation*. Ili estas pli grandaj, kun pli da muskoloj kaj foje kun tentakloj, kie tentakloj ne devus esti. Ili estas la rezulto de eksperimentoj kun T-viruso kaj aliaj variaĵoj, kiuj igus saninspektoron plori.

Ili rigardas min tenante la nazon supre, ĉar ili estas "biologiaj armiloj" kaj mi estas nur "ordinara infektito". Sed jen la afero! Mi ne bezonas aktivan vulkanon por definitive morti; sufiĉas al mi bone lokita kuglo, kaj tio faras min multe pli alirebla al publiko.

Kion la vivantaj ne komprenas estas, ke ĉi tio ne estas milito, sed tutmonda restarigo. Israelo provis fermi siajn limojn por ĉiuj krom por judoj kaj neinfektitaj palestinanoj, en speco de geopolitika optimismo, kiu finiĝis per civita milito. En Rusio, oni revenis al teokratio kaj devigis virinojn generi infanojn por repopoli la landon. Estas ĝoje. Ili kredas, ke la estonteco ankoraŭ apartenas al tiuj, kiuj spiradas.

Eĉ en la plej profundaj bunkroj, homoj daŭre diskutadas, pri kiu estas la gvidanto. Ili kondukas, kvazaŭ ili estus en izolita bieno en Pensilvanio, pridiskutante, ĉu estas pli bone kaŝi sin subtere aŭ eliri serĉe de benzino. Fine, ĉiam estas iu, kiu konfuzas postvivanton kun zombio kaj pafas al lia kapo ĝuste en la momento, kiam venas la savo. Tio estas la speco de cinika humuro, kiun la universo praktikas ekde kiam la unua satelito revenis de Venuso kun nevideblaj parazititoj.

Mi trapasis hospitalon antaŭ nelonge. Tie estis uloj ĵus elirinta el komato, sole promenante tra dezertaj koridoroj. Kompaktindulo. Verŝajne li kredas, ke li estas protagonisto de epika supervivrakonto. Li ne scias, ĉu la cirklo fermiĝos por li en hospitala lito, aŭ ĉu li finiĝos kiel giganta "Saluton"-afiŝo en arbaro, por ke finna aviadilo kolektu lin al kvarantena zono, kiu verŝajne jam estis falinta.

La vero estas, ke esti zombio estas la plej pura formo de nihilismo. Mi ne havas sentojn, ne havas kolektivajn konscionojn — kvankam foje ŝajnas, ke ni moviĝas sinkronie per stranga "resonado" de konsumado — kaj mi ne havas estontecon. Mi simple marŝas. Mi estas eĥo de tio, kio mi iam estis: repliko sen emocioj, kvazaŭ kosma sporo anstataŭis min, dum mi dormis.

La mondo resaniĝas. Ne plu ruinaj bruaĵoj de gratkonstruaĵoj, neniu novaĵoj pri apokalipso en Los-Anĝeleso, neniu malfunkciaj familioj provantaj transiri la limon al Meksiko sur boatoj. La ĉielo estas kovrita per nigra vualo de fumo el urboj, kiujn neniu plu provas estingi. Ĝi estas bela pejzaĝo, preskaŭ romantika, se ne estus pro tio, ke mia maldekstra okulo elfalas el sia kavo ĉiufoje, kiam mi rigardas la sunleviĝon.

Do, jen mi, partoprenante en la plej longa marŝo en historio. Sen direkto, sen celo, sen la streĉo ĝisdatigi mian vivresumon. La fino de homa civilizo ne estis tragedio; ĝi estis deviga antaŭtempa emeritiĝo. Se vi vidas min sur la strato, ne pafu min per

Nerf Elite 2.0. Ĝi ne funkcios kaj vi igos min senti min ridi-nda. Pli bone akceptu: la merkato parolis, kaj ni estas la oferto, kiu englutas la postulon. *Networking*, amikoj. *Networking* ĝis la osto.

Mi nomiĝas Gary. Mi estas eraro de la viruso *Solanum*. Laŭ la manlibroj, mi devus esti mallerta kaj stulta. Mi ne estas tute tia. Mia korpo paneas: malrapidaj muskoloj, koagulita sango, partoj, kiuj jam ne kunlaboras. Sed mi pensas. Mi observas. Kaj mi ridas. Mi ne dormas, ne sentas doloron, ne atendas rezultojn. Mi marŝas sen celo, observante, kiel la homaro falas pro sia propra nekompetenteco. Mi havas vantajn klarecon, kompletan memoron kaj tutan lingvon: ĉio por ĝui la finan absurdaĵon.


Ĉio estas nesignifa. Ĉio estas perfekta. Bonvenon al la fino de la mondo, amikoj.

Ludoviko de G.A.
Vilafranca del Penedès, februaro 2026

Notoj:

[1] *Key Performance Indicator*, aŭ Kerna indikilo pri efikeco.

[2] *Santa Mira* estas la nomo de fikcia urbo en pluraj sciencfikciaj aŭ hororaj verkoj:



Nouveau Larousse illustré (1897-1904)



KRATERO

Kratero estas registrita eldonejo de la *Asociació Cultural Ĝuo*, el Reus, en la sudo de Katalunio. Ni estas malgranda, neprofitcela asocio kiu, interalie, celas subteni Esperanton per niaj publikaĵoj – kaj ĝui la vojon!

Ne hezitu kontakti nin, eble ni povas fari ion kune!

Vizitu: kratero.eu





Bonvenon sur la Luno



Vi vekigās sur la luno sen memori, kiel vi alvenis. La lumo estas malvarma, blanka kaj trembrilanta; la tuboj de la laboratorio ŝajnas flustri. Via spiro sonas tro laŭte en la silento, kaj io krakas malantaŭ vi. Ne estas tempo turniĝi. Voĉo vokas vin laŭ via nomo, klara, firma... en Esperanto.

"Mi ne volas esti planto."

Estas via voĉo. Aŭ almenaŭ ĝi estis. Nun vi komprenas, kun frosta tremeto laŭ via spino, ke iu alia — aŭ io alia — parolas per vi. Antaŭ viaj okuloj, ekstertera planto moviĝas kun intenco. Ĝiaj radikoj etendiĝas kiel fingroj, esplorante ĉiun ombron, serĉante la sekvan homan ujon. Kaj vi estas la sekva.

La laboratorio estas nigrablanka versio de fuŝita sonĝo, kiu kosmariĝis. Ĉiu ombro ŝajnas vivi, ĉiu tremanta lumo desegnas monstrojn, kiuj ne devus ekzisti. Vi rimarkas, ke tio ne estas filmo; vi estas la ĉefrolulo, la monstro kaj la viktimo samtempe. La ekstertera planto observas vin, dum ĝi murmuradas instrukciojn en Esperanto, ĉiu vorto perfekta, preciza, kvazaŭ via destino povus esti sorĉita per ĝusta gramatiko.

Vi provas moviĝi, sed viaj kruroj respondas malrapide. Vi aŭdas la murmuron de aliaj korpoj, zombiigitaj, diskutante inter si pri tio, kiu el ili havas pli grandajn foliojn, kiuj kreskas pli rapide. Vi provas krei, sed ĉio, kio eliras el via buŝo, formiĝas en Esperanto: frazoj, kiujn vi ne memoras lerni, sed kiujn la laboratorio postulas prononci ĝuste. Ĝi fariĝis lingva torturo.

Vi scias, ke la tempo elĉerpiĝas. La sporoj tuŝas vian haŭton, kaj vi sentas, kiel via karno transformiĝas en ŝirmilon. Esperanto miksiĝas kun teruro kaj, en iu maniero, ankaŭ kun rido: la seriozeco de la situacio, la absoluta absurdeco de la luno, de la vegetalaj zombioj, kiuj parolas inventitan lingvon... ĉio estas tro, sed ne ekzistas eliro.

Sur la Luno ne estas justeco, ne estas logiko, nur la silenta komunumo de mortigaj plantoj kaj revivigitaj korpoj. Ĉiu vorto, kiun vi prononcas en Esperanto, memorigas, ke nenio gravas, sed ĉio rakontiĝas kun absoluta solemneco. La lingvo, kiu iam revis kunigi la homaron, nun priskribas vin dum ĝi transformas vin en biologiajn meblojn.

Kaj tiel, dum la radikoj komencas ĉirkaŭpreni vin kaj la lumoj palpebrumas super via nova vegetala hejmo, vi komprenas la plej terurigan veron: vi ne estas spektanto. Vi neniam estis. Ĉi tie, sur la luno, estas nur zombioj, Esperanto... kaj vi.

Ĉio finiĝas, kiam via cerbo miksiĝas kun la sanĝsuko de la planto. La lastaj vortoj, kiujn vi prononcas – klaraj, perfektaj, en Esperanto – estas:

"Mi ne volas esti planto."

Kaj la luno ridetas, indiferente.



Tio, kion vi ĵus legis, ne estis nur literatura deliro: ĝi havas konkretan ekvivalenton en la realo. Ĉi tiu rakonto baziĝas sur la filmo *Atako de la lunaj zombioj*, reĝisorita de Christopher R. Mihm, filmita nigrablance kiel omaĝo al la B-filmoj de la kvindekaj jaroj kaj, por plibonigi la sperton, tute dublita en Esperanto de realaj kompetentaj parolantoj. Jes, vegetalaj zombioj, kiuj parolas universalan lingvon.


Do, kara leganto, spiru profunde: eble vi estas la sekva por esti recikligita kiel biologia ŝirmilo, recitante gramatike perfektajn frazojn, dum eksterteraj radikoj vin postulas. Esperanto ĉi tie fariĝas la rakontanto de la neevitebla, kronikisto de la groteska kaj mesaĝisto de indiferenta kosmo, kiu ridas ĉe ĉiu konjugacio. Eĉ morto kaj la universo povas kompreni ĝin... kaj ili ne zorgas.

Rigardi la filmon ne savos vin, kompreneble. Ĝi nur permesas al vi observi el distanco, kiel via ebla destino okazas kun troigita solenececo, kiel la ridindaĵo estas traktata serioze kaj kiel utopia lingvo fine priskribi la senutilan tragedion de tiuj, kiuj alvenis sur la Lunon. Ĉar ĉi tie, leganto, nenio estas hazarda, ĉio estas neevitebla, kaj Esperanto ĉiam havas la lastan vorton. Kaj se vi kuraĝas rigardi... ĝi ridetas. Ne pro espero, sed ĉar eĉ via mizero povas esti perfekta, gramatike senmakula kaj, ĉefe, absurda.

Ludoviko de G.A.
15 februaro 2026

Vidu:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Atako_de_la_lunaj_zombioj



Zombia krokodilo kreita surbaze de la skeleto el la paĝo 28, per la samaj iloj kiel la elefanto (p. 23).



Recenzo: FreneZZono

Frenezzono estas esprimilo, kiu sekvas la plej puran fanzinan tradicion. En ĝi pluraj kunlaborantoj eksperimentas per ilustraĵoj, humoraĵoj, komiksoj kaj tekstoj en amuza kaj alloga fanzina maniero. Ĝi kombinas tekstojn en Esperanto kaj en la hispana. Tio, kio difinas ĝin, estas la libereco kaj la memfariteco. Frenezzono, tutkoloro, montras tuŝeblan kreemon: ne tiun, kiu restas enkarcerigita malantaŭ la vitro de ekranoj kaj kiu tiel facile vaporiĝas. Ĝi estas vera artaĵo, bindita per interesa kudrado per nur tri truetoj.

David Trigo kaj Laura Esteban eldonis kaj dezegnis la kreaĵon, dum la Esperanto-Asocio de Segovio presis ĝin, kaj la prezento de la fanzino estis gastigita de la Publika Biblioteko de Segovio.

Frenezzono estas miriga ne nur pro sia verfanzina stilo, sed ankaŭ pro sia fanzina maniero: oni vere sukcesis ĉirkaŭtiri grandan rondon da homoj por ĝia kreado; ne nur la fina produktaĵo estas valora, sed ankaŭ la vojo al ĝi enhavas mesaĝon. Sed Frenezzono estas pli ol esprimilo: ĝi estas ankaŭ mirinda komunikilo. Eble oni povas pensi: "Nu, kiel iu ajn revuo, ĉu ne?" Se vi tiel pensas, vi ankoraŭ ne tenis Frenezzonon en la mano.

Se vi ne havas la ŝancon havi ekzempleron, se vi vizitas Segovion, ne hezitu eniri ĝian Bibliotekon; tie vi povos flari, tuŝi kaj foliumi tiun nekutiman objekton. Ĝi atendas vin venontjare, post dek jaroj, kaj certe post jarcento. Ĉu same okazos al niaj retaj mesaĝoj? Estas granda moderneco reiri al papero!

ĜIS!

Astronomoj diras, ke Kometo revenos en septembro, tamen en la stranga mondo de Kometo oni ne povas fidi sciencon por antaŭdiri ion. Kiu estos la temo? Ĉu la vivo post la apokalipso? Ĉu kriptozoologio? Ni ne scias. Tamen ni povas antaŭdiri, ke ĝi estos io stranga, nekutima. Ni atingos nian celon, se vi, iom konfuzite, ekdemandos: "Sed kio estas tio?!"

Tio estas Kometo, la fanzino pri strangaj mondoj.





ĜUO

KOMETO, revenanta stelo, kiu anoncas vivon kaj morton. Alvoko al la imago aŭ monduma distraĵo.

KOMETO celas uzi sciencfikcion kaj fantaston por esplori eblajn mondojn per rakontoj, artikoloj kaj recenzoj.

KOMETO estas preteksto por paroli pri niaj revoj kaj timoj, kiuj speguliĝas en strangaj fabeloj.